

Dua (2-a) leciono.



Li skribas.


Ĉu li manĝas? Kiu skribas? Ĉu vi skribas? Ĉu vi skribas sur la lampo? Sur kio vi skribas? Mi skribas sur papero.



Ŝi legas.

Kiu skribas? Kiu legas? Ĉu vi legas?

mi estas



Ĉu vi estas Doktoro Szilágyi?



La instruisto. La lernanto.

Ĉu la instruisto estas doktoro Szilágyi? Ĉu de Gaulle estas instruisto? Kiu vi estas? Kiu mi estas? Kiu estas instruisto? Kiu estas lernanto?



Homo
homo.

Ĉu vi estas instruisto? Ĉu vi estas instruistino? Kiu estas instruistino? Kiu estas lernantino? Kiu estas homo? (Mi estas homo.) Ĉu la instruisto estas homo? Ĉu la poeto estas homo?



Besto — besto.

Kio estas la elefanto? (La elefanto estas besto.) Ĉu la hundo estas besto? Kio estas la kato? Kio estas la instruisto?



Objekto.

Kio estas la libro? (La libro estas objekto.) Ĉu la lampo estas objekto? Ĉu vi estas objekto? Kio vi estas? Ĉu la instruisto estas objekto? Ĉu la kato estas objekto?



Granda elefanto.
Malgranda kato.

Ĉu London estas granda? Ĉu la kato estas granda? Kio estas malgranda? Kio estas granda?



La malgranda homo
(infano) ploras.

Ĉu vi estas infano? Ĉu la infano ploras? Kiu ploras? Ĉu vi ploras?



La sinjoro estas riĉa,
li ridas.

Kiu ridas? Ĉu vi ridas? Ĉu la sinjoro ploras? Kiu ploras? Kiu ridas? Ĉu la sinjoro estas riĉa? Ĉu vi estas riĉa? Kiu estas riĉa? Ĉu la riĉa homo ridas? Kiu estas malriĉa?

Longa.


Mallonga.

Ĉu la muro estas longa? Kio estas longa? Ĉu kilometro estas longa? Kio estas granda? Ĉu la tablo estas longa? Kio estas mallonga?

Bona ĉokolado.



Malbona ricino.



Ĉu la ĉokolado estas bona? Ĉu vi estas bona lernanto? Kio estas bona? Kio estas bona besto? Ĉu la ricino estas bona? Ĉu Esperanto estas bona? Kiu estas bona?

Bela sinjorino
Malbela sinjoro.




Ĉu ŝi estas bela? Kiu estas bela? Ĉu Stockholm estas bela? Kio estas bela? Ĉu la sinjoro estas bela? Kiu estas malbela? Ĉu la muziko estas bela? Kio estas bela? Ĉu la gorilo estas bela? Kio estas malbela? Ĉu la hundo bojas? Ĉu la hundbojo estas bela? Ĉu la kato miaŭas? Ĉu la katmiaŭo estas bela?

Alta.

Longa.

Ĉu vi estas longa? Ĉu vi estas alta? Ĉu la muro estas alta? Kiu estas alta? Kiu estas malalta? Kio estas alta? Kio estas malalta? Ĉu la seĝo estas alta? Ĉu la muro estas mallonga? Ĉu ĝi estas malalta?



Adamson sidas sur la ŝtono.

Kiu sidas? Ĉu sinjoro Adamson sidas sur seĝo? Ĉu la ŝtono estas granda? Ĉu la ŝtono estas *mola*? Ĉu vi sidas sur malmola ŝtono? Kiu sidas sur la malmola ŝtono? Kiu sidas sur la seĝo?




La leporo venas. Adamson dormas.

Ĉu Adamson kuŝas sur la lito? Ĉu Adamson *dormas* sur la lito? Ĉu la lito estas *mola*? Ĉu la leporo iras? (Ne, la leporo venas.) Kiu venas? Ĉu la leporo estas homo? Ĉu ĝi estas granda besto?



Adamson ne dormas. Li rigardas. La leporo rigardas. Adamson miras.

Kio pendas? Ĉu Adamson dormas? Ĉu Adamson rigardas? Ĉu la leporo rigardas? Kiu rigardas? Kio rigardas? Ĉu Adamson miras? Kiu miras? Ĉu vi rigardas?



La leporo ne iras, ĝi restas.

Ĉu Adamson venas? Kiu iras? Ĉu la leporo iras? Kio sidas? Ĉu Adamson sidas sur la ŝtono? Ĉu sur la ŝtono estas homo? Kiu sidas sur la ŝtono? (*Neniu.*) Ĉu la leporo iras? (Ne, la leporo *restas.*) Ĉu vi iras? Ĉu vi restas? Kiu restas? Kio restas?